

Leterkesto, 3.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.04.11 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni havas la ĝojon daŭrigi la salutadon al la geaŭdantoj, kiuj sendis mesaĝon.

A.- Dankon al Ĵakov KRPAN en Karlkovac, Ĵugoslavio kaj al Vittorio kaj Luisa MADELLA en Parma, Italio, kiuj sendis du leterojn. Ĵen citaĵo el la unua:

Cl.- "Elsendoj pri la "verda naturo", en tempo, en kiu nia belega tero estas minacata de multaj negativaj faktoroj, al m ŝajnas esti tre aktualaj. Ĝi estas universala temo, ĉar la poluo ne fermiĝas ĉe la landlimoj, sed eniras facile aliajn iandojn en kiuj vivas gentoj, kiuj ŝatus transdoni la "patrinan naturon" tiel pure kiel liaj geavoj lasis ĝin al ili. Ĉu oni povos aŭdi similajn elsendojn?"

A.- Dum la somero ni dediĉos elsendaron al verkoj, kiuj okupiĝas pri klimataj kaj energiaj problemoj, provante kompreni ne nur la kaŭzon de la nunaj ekologiaj dramoj, kiujn ekvivas nia planedo, sed ankaŭ vidi, ĉu ekzistas kuracebloj. Kaj en alia elsendaro ni raportos pri la naturprotektado en Svislando.

Cl.- En sia dua letero Vittorio kaj Luise MADELLA pensas al la gesamideanoj vivantaj militajn eventojn. Ni citas:

A.- "Permesu al mi, ke mi bondeziru al gesamideanoj en Israelo, Irano, Egiptio, Turkio kaj Pakistano baldaŭn pacon kaj bonfarton. Estu la amo la vera venkanto de tiu sensenca milito kaj venu la tempo, en kiu ĉiu persono povas vidi en la alia amikon kaj fraton, kiel montris nia majstro Lazaro Zamenhof."

Cl.- Ni aldonu, ke ankaŭ al la samideanoj en Irako kaj Kovajto ni esprimas nian esperon, ke la nuna konflikto solviĝos antaŭ ol estos nur ruinoj.

A.- Niaj salutoj sin direktas al Lothar MAHER en Rottvveil, Germanio, al Rokuro MAKABE en Frankfurt am Main, Germanio, kaj al Norbert MERKENS en Wuppertal, Germanio, kiu sendis 14 aŭdraportojn, ĉiam kun interesaj rimarkoj.

Cl.- Pri unu el niaj klarigoj didaktikaj li faras demandon. Ni atentigis pri la danĝero, kiu minacas la elementan instruadon de esperanto, kiam oni uzas pertradukan metodon. Anstataŭ fari kreivajn strukturŝanĝajn ekzercojn, oni instruas nur la lingvo-formulojn, kiuj estas konformaj al la nacia lingvo de la lernantoj. Mi donis la ekzemplon de la ĉevalkapo. Tiu vorto povas diriĝi en esperanto ankaŭ per la ĉisekvaj formuloj: ĉevalokapo, ĉevala kapo, kapo ĉevala, kapo de ĉevalo. Mi provis kompreni, ke en lernolibroj por franclingvanoj oni ĝenerale trovas nur la formulon "kapo de ĉevalo", dum en la lernolibroj por germanlingvanoj oni donas la preferon al "ĉevalkapo". Norbert MERKENS demandas, ĉu en vortaroj aperu ĉiuj eblaj formuladoj? Mia respondo estas ne en la vortaro, sed en la lernolibroj, jes.

A.- Koncerne alian elsendon Norbert MERKENS skribas: "Via prezentado de verkoj el "Trezo" estis plezuriga. Per tio vi tutsimple konvinkas nin, aŭskultantojn, por aĉeti kaj legadi de legindaj verkoj."

CL- Jes, tio estas la celo de la elsendoj, kiujn ni dediĉas al legindaĵoj. Ni opinias, ke ĝenerale ia esperantistoj ne sufiĉe legas en esperanto, ĉar mankas al ili leg-konsiloj kaj ankaŭ rekta kontakto kun la esperanto-libroj, kiujn piej ofte oni aĉetas nur perkoresponde, dum la nacilingvaj librojn oni ĝenerale aĉetas en librovendejoj post trafoliumado kaj eĉ eklego. Ofte en multaj landoj la esperantistoj ne scias, kien direkti libro-mendojn, ĉar apenaŭ ekzistas esperantaj librovendejoj.

A.- Ekzemple Norbert MERKENS informiĝas pri la aĉeteblo de la verko "Zamenhofa ekzemplaro" de la japano Rihej NOMURA, kiun ni recenzis. En Svislando tiu libreto kvincentpaĝa kaj grandformata estas aĉetebla en la libroservo de Kultura Centro Esperantista kontraŭ 122.- svisaj frankoj. Tute certe ĝi estas aĉetebla ankaŭ en la libroservo de Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, Nederlando, kontraŭ proksimume 160.- guldonoj, kaj ĉe la eldonisto mem: Nagoja Esperanto-Centro, Nagoya, Japanio. Ni esperas, ke la ĉefaj libro-servoj en Germanio kaj aliaj landoj ankaŭ proponos tiun gravan vortaron pri la uzado de vortoj kaj esprimoj fare de Zamenhof. Almenaŭ por seriozaj esperanto-instruistoj kaj esperantologoj tiu libreto titolita "Zamenhofa Ekzemplaro" estas necesa komplemento al PIV.

CL.- Kelkaj aŭskultantoj, kiuj vivas en lando sen esperanta libroservo, informiĝis, ĉu oni povas perkoresponde akiri librojn el la libroservo de Kultura Centro Esperantista. Ni respondu, ke tio estas ebla. La interesatoj ricevas fakturon, kaj tuj kiam ilia pago atingis la koncernan Centron en Svislando, la pagitaj libroj estas sendataj registrite. Iom same funkcias la libroservo de UEA. Bedaŭrinde el multaj landoj oni ne rajtas transpagi monon al Svislando aŭ Nederlando, kaj tio estas granda handicap por la kultura disvolviĝo de esperanto en la nepagipovaj landoj, kiel oni nomas tiujn ŝtatojn ekonomie izolitajn de la aliaj.

A.- Reveninte el Brazilo, Lenio MAROBIN, kiu nun loĝas en Londono, Britio, daŭrigas la aŭskultadon de Svisa Radio Internacia.

CL.- Saluton al Jen MERKER en Cottbus, Germanio, kiu skribis: "Kun intereso mi preskaŭ ĉiusemajnfine sekvas viajn programojn el Bern. Kvankam via elsendo "nur" daŭras dek minutojn, ĝi do ĉiam entenas multe da interesaĵoj kaj mi volonte aŭskultas ĝin."

A.- István NAGY en Budapeŝto, Hungario, estis interesata de la prelego pri la marmotoj de nia kolego Arthur BAUR kaj de nia raporto pri la reeldono de la gazeto TEMPO fare de la japanoj. Pri la situacio en la ekskomunismaj landoj li opinias, ke ni ne tro esperu pri ofta skribado, ĉar la heredaĵo de la soveta komunismo estas prezaltiĝoj rapidaj, inkluzive tiujn de la poŝtaj tarifoj, dum la salajroj kaj pensioj ne sekvas tiujn prezaltiĝojn. Ni bone konscias pri tiuj problemoj, kaj des pli dankas al ĉiuj skribantoj el tiuj landoj kun altaj poŝttarifoj kompare al la salajroj. Povu en tiuj landoj pliboniĝi la ekonomia situacio dum la venontaj jaroj.

CL.- Preskaŭ ĉiusemajne gesinjoroj Bruno NAJBARO en Keighley, Britio, donas vivsignon post la aŭskulto de niaj elsendoj. 14 mesaĝoj de ili kuŝas en nia leterkesto. Ĉiutage ni havis la plezuron ilin renkonti en La Chaux-de-Fonds, kie ili venis ferii dum la novjaraj tagoj. Antaŭ ol forveturi el Britio, ili skribis, ke ili bedaŭras maltrafi parton de niaj didaktikaj rendevuoj pro feria foresto. Ni sendos al ili fotokopion de tiuj maltrafitaj rendevuoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andree GACOND remalfermos la venontan semajnon sian leterkeston por saluti la geaŭdantojn, kiuj sendis mesaĝon. Ĝis reaŭdo.